# EKO

**Esperiga Komuniko**

**Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado**


## Enhavo

- Irano unuafoje gastigas AMO-seminarion
- Allogas la 52a Kongreso de ILEI
- Nia skolta ligo anoncas novan retejon


Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

*Komuniko EKO 2019-04 el Budapeŝto, la 4an de marto*


*Al: Komitato kaj Sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO

# AMO 54 en Irano: Esperanto en Meza Azio

Ankoraŭ unu nova lando por la AMO-programo! La 55a seminario pri Aktivula Maturigo (AMO) okazos en Kaŝano, kadre de la 12a Mez-Orienta Kunveno, okazigita de la 28a ĝis la 31 de marto 2019. Vidu la raporton en EKO 2019-02 kun amaso da utilaj retligoj, inkluzive de la ebloj aliĝi al la aranĝo.

Jen la programeroj de la AMO-seminario, laŭ la ĉeftemo: 'Esperanto en Meza Azio'

Enkonduka prelego pri la kunveno - Renato Corsetti

Maria Butan: La Pejzaĝo kaj ĝia influo sur nin kun centraziaj ekzemploj

Annie Grente: Portretoj de mezorientaj rifuĝintoj

Benjamin Kwiecien: Kio estas komuna kaj malkomuna inter la persa kaj Esperanto

Kejhan Sajadpour: Unu el la grandaj literaturoj de la mondo: la persa

Nazi Solat: La Esperanto-movado en Irano: Historio kaj nuntempo

Prezidanto de la Uzbeka Esperanto-Asocio: Esperanto en Meza Azio

Ahmad Mamdoohi: Universitata agado en Irano kaj Internacia universitata interago

Taled Orabi: Etaj ŝanĝoj, egaj rezultoj

Mireille Grosjean: Kiam elefantoj batalas, la herbo suferas: Vundaj lokoj en la mondo.

Tatjana Loskutova: Esperanto en Uzbekistano.



# 52-a Kongreso de ILEI en Ĉaĉak

*Ĉefa temo: "Lernado en virtualaj komunumoj "*

La 52-a Kongreso de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) okazos en Ĉaĉak, sudokcidenta Serbio, inter la 13a kaj 20a de julio 2019, en la Fakultato de Teknikaj Sciencoj, apartenanta al la Universitato de Kragujevac. Tio certigas kvalitan okazigon de la jam tradicia dulinga simpozio. Por aliaj, certas bonetosa amikema kongreso kun riĉa programo, malferma ankaŭ al ne-instruistoj.

Kongreso de ILEI, 2019: Unua Komuniko (IPR 2018/3)

Bonvenon en Ĉaĉak, Serbio, 13 – 20 julio 2019 (IPR 2018/4)

Pri la programo de la 52-a Kongreso (IPR 2019/1)

Aliĝilo en PDF-formato.

Bonvolu prefere uzi la elektronikan aliĝilon, kiun vi trovos ĉi tie

La unua kotiza periodo finiĝas fine de marto.

- La konferenco traktos jenajn kaj ne nur tiujn subtemojn de la ĉeftemo:
- Scikreado en retaj lernkomunumoj
- Iloj kaj procedoj por lernado en virtuala medio
- Lingvolernado en virtualaj komunumoj
- Virtualaj komunumoj de indiĝenaj lingvoj
- Lernado de indiĝenaj lingvoj en virtuala medio
- Kondutmodeloj kaj normoj en virtualaj lernkomunumoj
- Retkomunumoj bazitaj sur retejoj de sociaj amaskomunikiloj
- Sociemo en sociaj retspacoj





En la programo: ekskursoj kaj la tradiciaj distraj vesperoj: interkona, nacia, internacia, muzika, bankeda adiaŭa, sed estos ankaŭ io nova. Legu pliaj detalojn per la jam donita ligilo al la programo. Tie vi ricevos instrukciojn, kiel proponi programeron.

La granda plimulto de la nacianoj de la mondo povas eniri la landon sen bezono por vizo. Vidu la liston (anglalingve ĉe https://en.wikipedia.org/wiki/Visa_policy_of_Serbia).

Nokta trajno trafikas de Vieno tra Budapeŝto ĝis Beogrado, kun du pliaj rektaj tagaj trajnoj el Budapeŝto.

La flughaveno Nikola Tesla en Beogrado gastigas tridek du flugkompaniojn. Vidu ĉe: https://eo.wikipedia.org/wiki/Nikola_Tesla_Flughaveno_Beogrado kaj eventuale iun nacilingvan version por pliaj informoj. Por atingi la kongresurbon, multaj busoj trafikas dumtage inter Beogrado kaj Ĉaĉak. LKK organizos por vi, se vi petos, la transporton rekte el la flughaveno ĝis la kongresejo.

Por atingi Finnlandon por la UK en Lahtio, uzeblas rekta flugo el Beograd al Helsinki sabaton, la 20-an de julio, kun ekflugo je 06h35 el Beogrado kaj alflugo je 10h10 en Helsinkon, trovebla per

https://booking.airserbia.com/dx/JUDX/#/home

LKK organizos malmultekostan transporton el Ĉaĉak ĝis Beograd je konvena tempo por atingi la flugon.

# Plia faka asocio progresas – nun la skoltoj

Skribas Héctor CAMPOS GREZ el Ĉilio: “Mi invitas al vi ĉiuj viziti la novan oficialan retejon de Skolta Esperanto-Ligo, atingebla ĉe la adreso https://www.skolta.org




Se vi konas iun kiu estas/estis membro de Skoltina aŭ Skolta Movado, aŭ iu esperantist(in)o kiu membras en la skolta movado, informu pri la retejo kaj Skolta Esperanto-Ligo. Tie ĉi estas granda oportuno por instrui Esperanton.”

Vortoj: 640

======================

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento nun tute ĝisdata ĝis la fino de 2018. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj de UEA, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.